

SANO

JARKOLEKTO 1994

NUMERO 3

ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO MEDICINISTAJ INFORMOJ



SANO – enhavo de la numero 3/1994:

Doktoro Josef Hradil 70jara (Chrdle)	3
Tropikaj malsanoj riskataj dum vojaĝoj/ protoŭoaj parazitaj / spozozooj	4
Pri bova spongioforma encefalopatio (frenezeco de bovaro) oficiala informo	8
Fungoj kaj sano (Zvara)	10
La korpo de la homo / enkonduko (Chrdle)	12
1. Ostaro (Chicke)	13
Ostaro de antaue	13
Torako	13
Kranio	14
Ostaro de malantaŭe	14
Vertebraro	15
Ostoj de piedo	15
Ostoj de mano	16
Rimarkoj de la faka redaktoro (Hradil)	16
Medicinista mozaiko	
Antaŭnaska skrinigo de la Down-sindromo	17
Rezultoj pri lernigo de diabetuloj	17
Hejma nasko	18
Karcinomo de prostato	18

PERANTOJ:

Aŭstrio	: Vinko Ošlak, Viktringer Ring 25/1/3, 9020 Klagenfurt
Bulgario	: Marin Bacev, P.K.1054, 1000 Sofia
Germanio	: Rolf Terjung, Finkenschlag 68,47279 Duisburg
Hungario	: Edith Vigh, Taborhelz u.4, 1149 Budapest
Italio	: Romano Bolognesi, Via Misa 4, 40138 Bologna
Japanio	: Humiya Morita, Yamakawa Oiwake, 1-6-10-402, Kurume-si 830
Koreio	: Puramo Chong, 2 dong 50-2 ho, Kwangmyong-shi, Kyonggi-do
Pollando	: „NEPO“, M. Wnuk, skrytka 105, Broniewskiego 77 m.137
Ruslando	: Halina Gorecka, p.k. 67, 620014 Jekaterinburg 14
Slovakio	: Magdalena Feifičová, Trieda Obrancov mieru 25/5, 01001 Žilina
Ceteraj landoj	: Libro servo de UEA aŭ rekte eldonanto

SANO - Medicinistaj Informoj, eldonas Kava-Pech, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Praha), kunlabore kun Medicinista sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, respondeca redaktoro: Dr Petr Chrdle, Faka redaktoro: Dr. Josef Hradil, grafika aranĝo: Mgr. Stanislava Chrdlová
Abonotizo por unu jaro: 18 NLG (landoj B laŭ UEA 10.50 NLG, Ĉeĥio 40 Kčs, Slovakio 60 Sk, aldono por aerpoŝta sendado 8 NLG) **ISSN: 1210-5775**

Doktoro Josef HRADIL 70-jara

La 22-an de novembro ĝisvivas la faka redaktoro de la medicinista informilo SANO kaj aktiva kuracisto d-ro Josef Hradil sian 70 jaran vivojubileon.

Li naskiĝis en Praga familio de kuracisto, abiturientiĝis en 1942 kaj estis plene okupita en la familia kurac-pensio en Skokovy. Unu el la plej gravaj tagoj de Josef Hradil estis la 31-a de aŭgusto 1951, dum kiu li doktoriĝis kaj samtage ankaŭ edziĝis. Kun sia edzino ili edukis kvar infanojn. Post kvar jaroj en interna sekcio de la distrikta hospitalo en Trutnov li laboris 12 jarojn kiel entreprena kuracisto en aŭtomobila entrepreno kaj sekve jam kiel memstara subdistrikta kuracisto ĝis sia emeritiĝo. Li daŭrigas ĉi tiun fakan agadon eĉ kiel pensiulo kaj ĉijare li privatiiĝis kaj nun laboras en la sama konsultejo en Mnichovo Hradiště kiel privata praktika kuracisto. Krome, rricevinte post falo de komunismo la familian pensionon en Skokovy li kun siaj familianoj rekonstruas ĝin al sia origina celo – tiu de rekondiciga pensio, en kiu doktoro Hradil jam havas sian duan, semajnfinan, konsultejon.

Josef Hradil ekinteresiĝis pri Esperanto en 1949, kiam li aŭtodidakte ellernis ĝin, sed ekaktiviĝis nur ĵpŝt 10 jaroj. Ekde tiam li apartenas al la plej viglaj esperantistoj kaj fariĝis motoro de la Esperanto-movado ne nur en sia regiono Mnichovo Hradiště, sed ankaŭ en la tutŝtata skalo. Li fondis medicinistan sekcion de CĈEA, kiun li gvidas ĝis nun, en la jaro 1976 ekstartis la aperadon de la revuo SANO, al kiu li restis fidela ĝis hodiaŭ, redaktas ankaŭ la informilon Verda familio, multajn jarojn li instruis Esperanton, inter alie en formo de skribas kursoj kaj aranĝis 7 paroligajn renkontiĝojn de la frekventantoj de tiuj skribaj kursoj, aktivis multajn jarojn kiel membro de Universala Medicinista Esperanto Asocio UMEA, por kies bezono li verkis Medicinan Internacian Terminaron kaj en la jaro 1983 organizis IMEK en Poprad. ... Ne eblas nomi ĉiujn meritojn de Josef Hradil por nia movado, pro kiuj li inter alie fariĝis honora membro de ĈEA. Mi nur prenis al si agrablan devon almenaŭ iom konatigi al vi, karaj, legantoj, nian redaktoron, sen kiu ne povus ekzisti ĉi tiu faka periodaĵo.

Al doktoro Hradil mi deziras nome de ni ĉiuj legantoj de SANO precipe firman sanon kaj daŭrigon de lia neelĉerpebla energio ankoraŭ dum multaj jaroj.

Petro Chrdle

Tropikaj malsanoj riskataj dum vojaĝoj

(La kvara parto: Protozooj parazitaj-1)

Prof. Dr. Rudiger Sachs, Instituto pri tropikaj malsanoj, Hamburgo

Sporozooj

Sporozooj estas klaso de protozooj, kiuj formas „sporozoitojn“. Tio estas specifa evolustadio dum la plimutiĝa procezo. Sporozooj estas senescepte parazitaj. „Sporo“ estas ĉirkaŭĉeligita rezistokapabla daŭroformo. La evolua ciklo de sporozooj okazas en tri fazoj kaj inkluzivas ĉiam generacian ŝanĝon:

1. la senseksa plimultiĝo (sizogonio) en la homa sango,
2. la estiĝo de seksformoj (gamogonio) kun fertiliĝo en la moskito,
3. la senseksa plimultiĝo (sporogonio) en la moskito kun formiĝo de sporozoitoj.

La klaso de sporozooj entenas plurajn ordojn kaj subordojn. La kaŭzantaj agantoj de la homa malario, la plej grava malsano en tropikaj regionoj, apartenas al la ordo Kokcidedoj (Coccidida), subordo Hemosporinoj (Haemosporina), familio Plasmodiedoj (Plasmodiidae).

Al tiu familio apartenas 8 genoj : kvar de ili kapablas evolui en mamuloj, kaj kvar en birdoj. La diversaj specioj de malariaj parazitaj estaŝs specife adaptitaj al certaj bestoj. Pro tia „gastiganto-

specifeco“ ne ekzistas adekvataj eksperimentaj animaloj por la homaj malariaj specioj. Tiu fakto kaŭzas gravajn malavantaĝojn dum koncernaj esplorlaboroj, ĉar ne eblas kopii la naturan vivociklon de la parazito en la laboratorio.

Pli ol la duono de la homaro vivas en endemiaj regionoj por malariaj infektiĝoj.

La malsano okazas ne nur en tropikaj kaj subtropikaj regionoj, sed okupas ankaŭ sufiĉe grandajn partojn de la moderaj regionoj. Distribuo de la malsano sekvas la varmbezono de la insekta vehiklo, nome moskitoj en la genro Anofelo (Anopheles).

Evoluo de la parazitoj en anofeloj dependas de minimume 16°C somera izotermo, sed la plimulto de kazoj okazas en la 23°C somera izotermo. Tie la parazitoj trovas tutjaran ŝancon por daŭra kaj sukcesa disvolviĝo kaj por daŭra kaj sukcesa infekto de la homo.

En tropikaj landoj oftas la plej danĝera formo de malario pro infektiĝo per Plasmodio falcipara (plasmodium falciparum). En aŭropaj landoj troviĝas (Italio, Finnlando) aŭ troviĝis ĝis mezo de ĉi tiu jarcento (Germanio, Rusio) endemiaj fokuso, precipe de la specio Plasmodio vivaksa (Plasmodium vivax), la kaŭzanto de la „tritaga febro“.

La infektiĝon e la homo mem kaŭzas la sporozoitoj, kiuj formiĝas en la plasmodioinfektita femela anofelo. Tiuj infektaj stadioj estas inokulataj kun la salivo dum la sangosuĉado. Jam post unu joro la sporozoitoj malaperas el la sangocirkulado kaj enpenetras la parenĥimajn ĉelojn de la hepato. Tie ili evoluas dum procezo nomata „ŝigozonio“ al diferencaj stadioj (trofozoitoj, merozoitoj, ŝizontoj) detruantaj la hepatoĉelojn.




Fig. 1 Evolucio de la malaria parazito Plasmodio vivaksa - la kaŭzanto de la „tritaga febro“.

La lastaj stadioj – post la multiĝa procezo en la hepato – de la junaj parazitoj (merozoitoj) kapablas invadi eritrocitojn. Al la hepata multiĝofazo sekvas sangofazo. Pro la sinkroneco de la sekvanta sangofaza multiĝo – kun rompiĝo de infektitaj eritrocitoj kaj denova infekto de antaŭe infektitaj eritrocitoj – okazas priceza 48-hora (Plasmodium vivax) aŭ 72-hora ciklo (Plasmodium malariae), rezultante en tipa „tritaga“ aŭ „kvartaga“ fabro / la febroatakoj estas la reagoj de la homa korpo kontraŭ la sinkrona amasa disfalo de eritrocitoj.

Post kelkaj febroatakoj la parazitoj ŝanĝiĝas en pluan evolustadion, la „gamontoj“, kiuj – post ingesto fare de la moskito dum la sangosuĉado – pluevoluas en la insekta intestaro al generaj ĉeloj, la „gametoj“ t.e. diferencaj masklaj kaj femalaj seksĉeloj (respektive: mikrogametoj kaj makrogametoj). Post la fertiliĝo estiĝas ronda stadio, la „cigoto“, kiu diferencas post 18 horoj al longiĝinta stadio, la „ookineto“ kaj penetras en la intestovandajn ĉelojn de la insekto. Tio eblas ĉe 40 specioj de la genro Anofelo, sed ne ĉe moskitoj de aliaj genroj (ekzemple Culex, la insekta vehiklo de elefantiazo, aŭ Aede, la insekta vehiklo de flava febro). Post plua evolua procezo, la „sporogonio“, disvolviĝas sporozoitoj, kiuj – post disfalo de la intestaj ĉeloj – estas troveblaj en la hemolimfo (t.e. la insekta „sango“), kaj invadas la salivoglandon. La daŭro de tiu disvolviĝo dependas de la ĉirkaŭa

temperaturo, sed daŭras minimume 8 tagojn ĉe optimuma temperaturo de 28°C ĝi daŭras por P. Vivax – du semajnojn kaj por P. Malariae – 5 semajnojn.

	Pl. vivaksa	Pl. ovata	Pl. malaria	Pl. falcipara
junaj stadioj				
evoluantaj ŝizontoj				
maturaj ŝizontoj				
gamontoj femalaj kaj masklaj				

Fig.2 Evolustadio de 4 Plasmodiospecioj en la homa sango

Sub 16°C (por P. Facilparum sub 20°C) ute ne okazos sporogonio. La moskito estas la „fina gastiganto“ de plasmodioj, ĉar ja estas la insekto, en kiu evoluas la seksmaturaj stadioj de la parazito. La homo rolas kiel „intera gasstiganto“, en kiu evoluas nematuraj parazitstadioj necesaj

por kompletiĝo de la parazita vivociklo.

La kaŭzanta parazito-specio de la homa „tritaga febro“ (Malaria tertiana) estas Plasmodio vivaksa (Plasmodium vivax, Grassi!Feletti 1890). Ankaŭ Plasmodio ovala (Plasmodium ovale, Stephens 1922) kaŭzas febroatakojn en tritagaj interspacoj. La kvartagan febron (Malaria quartana) kaŭzas Plasmodio malaria (Plasmodium malariae, Laveran 1881, Grassi!Feletti 1890).

Plasmodio falcipara (plasmodium falciparum, Welch, 1987) estas la kaŭzanto de la danĝera tropika formo de malario. Tiu specio – ofte mortiga kaj okazanta precipe en landoj proksime al la ekvatoro – produktas dmm la sangofazo speciale altajn parazitnombrojn. Infektitaj eritrocitoj algluas sin al la sangokapilaraj vandoj en la cerbo. Sekvas inflamo de la cerbo, la tipa signo de tiu malsanoformo, nomata Malaria tropica. La inkubacia tempo de Plasmodio falcipara-infkto estas 7 ĝis 12 tagoj. Kontraŭe al la precizaj febrointervaloj ĉe la aliaj malariaj formoj, la febro povas esti daŭra aŭ neregula aŭ la febro-atakoj okazas en 48-hora ritmo.

Pri bova spongioforma encefalopatio de la brutaro (BSAE, „Frenezeco de bovaro“)

Oficiala informo de Germana Gfederacia Ministerio por Esploro kaj Teknologio (BMFT) en Bonn de la 22a de junio 1994)

Problemo de eblo pri la infekta BSE estas nuntempe objekto de la intensa intereso de la publiko. Por klarigi tiujn demandojn interrilatajn al BSE, MMFT subtenas ekeston de la nova esplora asocio. Naŭ laborgrupoj en ok universitatoj estas dotataj per tri milionoj da DM, provizore por la plej proksimaj tri jaroj. Tiu projekto estas parto de la programo de „baza esploro de infektoj“, subtenata de Federacia Registaro.

BSE estis unuan fojon konstatita en Britanio en la jaro 1985. La kaŭzo estas ĝis nun nepruvita kaj nekonata infektaĵo, kiu kaŭzas moligon kaj malaperon de la cerba materio de atakita besto. Tion sekvas disturbo de ĝia cerba funkcio kaj givdas al morto. En Granda Britabio mortis pro tiu malsano pli ol 120 000 bestoj. En Germanio estas konataj 3 kazoj de la malsano, en Svisujo jam pli ol 80. La celo de la esploro estas klarigo de ebleco de kontaĝo al la homo. Nuntempo ankoraŭ vakas pruvoj de la kontaĝo al la homo, ekz. per konsumado de kontaĝita viando aŭ per uzo de medikamentoj produktataj de la kontaĝitaj organoj.

Similaj malsanoj estas konataj ĉe la homo jam delonge sub la nomo de Creutzfeld/Jacobĉon-a malsano (CJD) kaj Gerstamnn-Straussler-Scheinker-a sindromo (GSSS). La nova esplora asocio deviga konstatas, ĉu BSE estas kontaĝa kontraŭ la homo kaj ĉu al tiu ĝi povas kaŭzi la nomatajn malsanojn.

La plej proksima celo de la esploraj laboroj estas karakterizi la kaŭzanton de la kontaĝo, kiu ĝis nun ne estis izolita kaj pri kiu vakas informoj. Ĝis nun eĉ ne estas kontae, ĉu temas pri viruso – en la kontaĝitaj histoj nenia tia estis trovita.

La esploro estas ŝarĝata per la fakto, ke necesas kalkuli pri eksterordinare longa inkubacia tempoperiodo – inter kvin kaj tridekkvin jaroj, kio praktike malebligas observi epidemian ĉenon ĝis la fonto de la kontaĝo. Krome estas neniam signoj de reago de imuna sistemo tiel, ke la malsano ne povas esti pruvata antaŭ ekesto de klinikaj simptomoj.

Dua direkto de la esploro estas serchado de genetikaj interrilatoj, eventuale de genetikaj supozoj de la malsano.

Laŭ „proklamo de la Federacia ministerio por sanzorgo por antaŭŝirmo de la konsumantoj estas ekde marto 1994 en FRD malpermesite furaĝi per vianda kaj osta bestfaruno. La federacia registaro eldonis ordonon, per kiu ĝi malpermesas uzon de kelkaj organoj el la brutaro (cerbo, limfaj organoj, intesto) kaj eĉ manĝon de bovaĵo, kiu venas el Britanio, por produktado de la infana kaj suĉinfana nutraĵo. Tiu decido estis transdonita lal la Eŭropa Komisiono por konfirmo.

Ĉiuj bovoj importitaj post la jaro 1988 de aliaj membraj ŝtatoj estas registritaj kaj ne rajtas esti buĉitaj. Ekde februaro 1994 estis altigitaj postuloj pri kvalito de krudaĵoj por produkto de medikamentoj el organoj de bovinoj kaj bovidoj. Similaj reguloj validas ankaŭ por produktado de kosmetakaĵoj.

La Eŭropa Komisiono preparas krome devigan registron de ĉiuj kazoj de Creutzfeld-Jacobson-a malsano.

Krome taksas Federacia ministerio por sanzorgo necese enkonduki pluan limigon de eksporto de novaĵo el Britanio en ĉiujn membroŝtatojn de Eŭropa Komunumo.


Esto permesate vendi nur viandon de bestoj, kiuj estas pli junaj ol tri jaroj kaj devenas el brutgregoj, inter kiuj ne aperis minimume dum la lastaj 4 jaroj iu kazo de BSE. Dum ĉiu buĉo devas esti antaŭmetata atesto pri deveno de la besto. Ĉe bestoj devenantaj el Britanio neniukaze (t.e. eĉ ne ĉe la bestoj pli junaj ol 3 jaroj) oni povas uzi cerbon kaj mjelon, lienon, pankreason, tiroidon, stomakon kaj intestaron.

jh-laŭ D-ro Milo3 Hrabák, en“ Medicina 3/94

FUNGOJ KAJ SANO

Inĝ. Milan Zvara, Poprad (SK)

Opinioj pri fungoj kiel homa nutraĵo estas diversaj, ofte eĉ kontraŭaj. Kompreneble, se ni nun mencias pri fungoj, ni pensas nur pri fungoj, kiujn ni kutimas kolekti por manĝado.



Ofte oni kolektas fungojn uzante malkonvenajn, eĉ plastajn saktetojn, kie fungokorpoj defektiĝas kaj fizike kaj ankaŭ el mikrobiologia vidpunkto. Tial preferu uzi por la kolektado de fungoj korbetojn.

Manĝeblaj fungoj en multaj landoj estas tre ŝatataj speciale pro la gusto. Pri la nutra valoro de fungoj estas diversaj opinioj, ne ĉiam objektivaj. Diversaj opinioj pri la nutra valoro de fungoj devenas de pasinteco. Kelkaj aŭtoroj komparis fungojn kun viando kaj ovoj aŭ laktoproduktaĵoj. El tio evoluiĝis opinio, ke fungoj estas, ke ili el nutra vidpunkto estas senvaloraj, ĉar konsistas plejparte el akvo. Interesa estas ilia aromo.

La nuna opinio pri nutra valoro de fungoj estas pli objektiva. Nun ni nutraĵojn ne pritaksas nur laŭ ĵaŭloj (kalorioj), sed laŭ enhavo de la necesaj substancoj por la homa korpo. El tiu vidpunkto fungoj estas tre interesaj. Ili enhavas multajn gravajn vitaminojn, mineralajn substancojn, esenciajn aminmoacidaĵojn ktp. Tio signifas, ke fungoj estas valora kompletigo de nia ĉiutaga nutraĵo.



La plej ŝatata kaj kolektata fungo estas boletu nobla picea (*Boletus edulis*) kaj boletu nobla kverka (*Boletus recitulus*).



Frititaj ĉapeloj de ombrelfungo granda (*Lepiota procera*) estas tre ŝatataj kaj bongustaj. Manĝante ilin vi havas iluzion pri viandaĵo.



Buterfungo flava (*Suillus luteus*) estas abunda en pinarbaroj.

Krom la nutra valoro, ili estas tre bongustaj. Sekigitajn fungojn ni ofte uzas kiel spicaĵon por plibonigi diversajn manĝaĵojn. Ni devas konscii, ke fungoj ne estas facile digesteblaj. Tio signifas, ke la fungomanĝaĵo ne indas por infanoj, kiuj ankoraŭ suĉas patrinan lakton, por tiuj,

kiuj malsanas pro la stomako aŭ hepato. Fungomanĝaĵon ni kombinu kun legomoj kaj diversaj salatoj, terpomoj, rizo ktp.



Se ni ŝatas manĝi fungojn, ni devas zorgi, ke ni ne formanĝu venenajn fungojn. Do, kiel preventi veneniĝon. Por manĝaĵo ni kolektu nur tiujn manĝeblajn fungojn, kiujn ni bone konas. El la menciitaj ni ne prenu tiujn fungojn, kiuj estas jam maljunaj kaj putriĝintaj. Post kolekto ni klopu tujn prilabori ilin por manĝaĵo aŭ ni sekigu ilin aŭ konfitu.

Tremolfungo ruĝa (*Lecicium aurantiacum*) estas tre bela kaj bongusta. Ĝi kreskas sub tremolarboj.

Rimarko de la redakcio:

Post ĉi tiu ĝenerala artikoleto pri fungoj la aŭtoro, konata mikologo, kiu inter alie gvidas ĉiujarajn mikologiajn seminariojn en Poprad, pretas verki fake pli profundan daŭrigon... se venos intereso de niaj legantoj.


LA KORPO DE LA HOMO

ekde ĉi tiu numero ni aperigos en SANO serion de ilustraĵoj prisi nia homa korpo (plejparte deprenotaj de la libro de Harald Schicke „La korpo de la homo“ kiu aperis en la eldonejo MZ Verlag, Im Heidewinkel 45, DE-21271 Asendorf.

Nia intenco estas prezenti unuopajn partojn de la homo (kiujn plejparto de nia legantaro verŝajne konas) ne por instrui vin, sed por kontribui al unuiĝo de la fakaj terminoj en Esperanto, kies unua fazo estu tamen registro de la terminoj ekzistantaj. Do mia peto estas jena: ne hezitu, se via opinio ian parton vi nomus alimaniere kaj skribu al ni, ke ni povu diskutigi pri koncerna nocio la ceteran legantaron de SANO. Tiamaniere ni volas almenaŭ iom kontribui al la evoluo de Esperanta faka temrinologio en medicino. Se la rubriko pri la korpo de la homo renkontiĝos kun via intereso, ni povos daŭrigi per la terminologio de malsanoj (mi menciuj ekzemple **ajdos** laŭ originalo de Prof. Sachs en n-rp 1/94 kaj aidoso en n-ro 2/94 post korekto flanke de d-ro Hradil).

Ni intencas aperigi unuopajn partojn kun jena enhavo:

- SANO 3/93 parto 1: Ostaro
- SANO 4/94 parto 2: Muskolaro
- SANO 1/95 parto 3: Digestaj organoj
- SANO 2/95 parto 4: Koro kaj sangocirkulado
- SANO 3/95 parto 5: PrOrganoj de spirado kaj voĉo
- parto 6: Urinaj organoj
- SANO 4/95 parto 7: Seksaj organoj
- SANO 1/96 parto 8: Nervaj organoj
- parto 9: Sensaj organoj
- SANO 2/96 parto 10: La ceteraj homopartoj



Pritakso de tiu ĉi enkonduko al la nova serio mi havas agrablan devon danki al kolegoj Harald Schicke por lia afabla aŭtoro permeso uzi laŭ nia plaĉo kiun ajn fragmenton de lia supre menciita verko kaj al la faka redaktoro se Sano (kaj inter alie aŭtoro de la medicinista terminaro de UMEA) d-ro Josef Hradil por lia preteco gvidi (espereble viglan) fakan terminologian diskuton sur paĝoj de nia informilo surbaze de viaj kontribuoj.

Petro Chrdle

Rimarkoj de la faka redaktoro de SANO

5 lumbaj vertikoj (en: Ostaro de malantaŭe) – grava eraro, devus esti vertebro, „vertikoj“ estas superflua neologismo

Ostoj de piedo: la prezentita bildo pri pieda skeleto (rigardo de interna flanko, maldekstra supra bildeto) – temas pri patologia bildo de tipa plana piedo (pesplanus).

Jenajn rimarkojn bv. Kompreni ne kiel atakon kontraŭ valora verko de Harald Schicke, sed kiel komencon de faka diskuto pri la temo, precipe (sed ne nur) terminologia.

Josef Hradil

MEDICINISTA MOZAIKO

Antaŭnaska skrinigo de la Down-sindromo

La sukcesoj de la antaŭnaska diagnozado kaj uzo de molekule-genetikaj esplormetodoj donas novajn eblojn diferenci normalan kaj nenormalan feton jam dum la tria monato de gravedeco. Samtempa malkovro de la plej ofta genetika malsano – sindromo de Down – estas ankoraŭ ĉiam teknike malfacila kaj tial amniocentezo kun la sekva esploro de la amnia likvaĵo estas praktikata preskaŭ nur ĉe la virinoj pli aĝaj ol 35 jj. Tamen preskaŭ 80% da infanoj kun tiu sindromo naskas al virinoj pli junaj ol 35 jj. La konstato de la nivelo de alfa-fetoproteino dum la dua trimestro ebligas konstati pozitivecon nur ĉe 35% da kazoj, tamen laŭ konstato de Haddow en kombinaĵo kun aliaj markeraj eblas diferenci virinojn, kies fetoj havas sindromon de Down en preskaŭ duobla nombro. Ĉi tiuj aŭtoroj provis trovi konvenan neinvadan metodon por detekcio de fetoj kun altigita risko por kromozomaj anomaliaj, helpe de konstato de tri serumaj markeraj (alfa-fetoproteino, homa ĥoriona genadotropino kaj estriolo) jam en la 15a ĝis 20a gravecsemajno.

Rezultoj, kiujn li publikigis en N.Engl.J.Med. Montris, ke kombinita esploro de tiuj tri markeraj ebligas detekton de pli ol 60% da kazoj de la sindromo de Down, kiuj havis nur kvinpercentan falsan pozitivecon.

Jh-laŭ N.Engl.J.Med 327,92,588

Rezultoj pri lernigo de diabetuloj

El Hamburgo venis raporto pri sanpolitiko helpe de kuracista homorario. Oni esploris, kiel efikas je la metabolismo de diabetulo de la IIA tipo lernigado de kuracistoj, realigata dum du jaroj per kuracistoj, kiuj havis konvenan postgradualan edukon. 12 monatojn post kiam 139 posedantoj (kuracistoj) de interna kaj ĝenerala licenco finis la kurzon gviditan de diabetaj fakuloj kaj la pagon por ĝi ili povis depreni de la imposto, pliboniĝis parametroj de iliaj malsanuloj-diabetuloj tute surprize: la pezo malleviĝis meznombro je 2,8 kg, HbA1c malleviĝis el 8.11 – 1.68% al 7.47 – 1.64%, eĉ se la pacientoj uzis meznombro nur 0.76 – 1.11 tablojdojn da sulfonil-ureo anstataŭ 1.4 – 1.42 tbl/tage. La nombro da malsanuloj kiuj entute ne uzis tablojdojn malleviĝis de 63% al 42%. Neniu elpenaĵo, sed sencohava sukceso.

jh

Hejma nasko

estas pli danĝera ol nasko en hospitalo. Statistika resumo montras (analizo de 885 000 naskoj), ke la hejma nasko kun helpo de akuŝistino havas mortecon de novnaskitoj de 1.3 ĝis 1.6 promiloj, kontraŭe la naskoj en hospitalo nur de 0.5 ĝis 0.7 promiloj.

Jh-laŭ Arzte Zeitung 4/94

Karcinomo de prostato

Eble triono da viroj post kvindekjaraĝo havas histologiajn signojn de karcinomo de prostato, tamen nur ĉe malgranda ono disvolviĝos maligna malsaniĝo. Ĉe viroj kun klasifika grado 1 kaj 2 proviĝis konservativa kuracado, ev. kun hormona terapio, precipe se ili atingis la aĝon, kiam oni provas supozi ilian finvivon pli mallongan ol 10 jaroj

jh-laŭ N.Engl.J.Med. 1993,330:242-248

KAVA-PECH


Eduka kaj Turisma Entrepreno de d-ro Petro Chrdle Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice

1. oferto por esperantistoj de la eldona fakto:

Frank H.: Propedeutická hodnota mezinárodního jazyka / Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo
 Lobin G. Bink E. (komp): Kybernetik und Bildung/Kibernetiko kaj klerigo
 Frank H.: Mallonga enkonduko en la kibernetikan pedagogion
 Maxwell D. Preotu M. Tacu A.P. (ed) Lingvo kaj Kibernetiko
 Ĉapek K.: Milito kontraŭ salamandroj
 Kantoj de l'popolo – Slovakaj kantoj sur kasedo aŭ kompaktdisko
 Hašek J.: Ne nur soldato Ŝvejk
 Chrdle P., Chrdlová S. " Esperantem za 3 měsíce
 Chrdle P. (ed): Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto
 Kraft K., Malovec M.: Slovník esperantsko-český

2. oferto pro esperantistoj en la turisma fako:

Invito de Nova Jaro en Prago	1994-12-29/1995-01-02
Simpozio Entreprenado pere de Esperanto: Dobřichovice	1995-05-10/14
Ĉefaj trakttemoj:	
A. Speciafaj trajtoj de Esperanto rilate entreprenadon ĝenerale	
B. turismo	
C. Eldona agado (periodaĵoj kaj neperiodaĵoj)	
D. Internacia komerco	
Itinero laŭ la soldato Ŝvejk:	19958-05-14/20
Konkurso Filmo kaj Video, Brno (kunlabore kun ĈEA)	1995/10/20/22
10-taga flugkaravano al Koreio kaj Japanio	aŭtuno 1995
IFES, Internacia Fervojista Esperanto-Skismajno (kunlabore kun la fervojista sekcio de ĈEA kaj IFEF)	1996/02/18/24
... kaj libervolajn itinerojn por grupoj en dezirataj nivelo kaj dato	



**Pensiono S K O K O V Y en koro de la Ĉeĥa Paradizo
 CZ-29414 Žďár u Mnichova Hradiště**

**renkontiĝejo de esperantistoj
 familia esperatista medio
 venu firmigi vian sanon!**